La scivolemo min puŝis kaj mi Ĉeestis apud 20 geidistoj kiel rigardanto, tute ne intencante paroli. Al la fino de la kunveno kiam oni diskutis „Quale on lernas la lingui", venis S-ro de Saussure. Salutita, li ne detenis sin por respondi, dirante, ke se Idistoj profitis la spertojn de Esperanto, li profitis ankaŭ tiujn de Ido, tial lia projekto Esperantido estas pli scienca, pli progresema, io por konkordiĝo de ambaŭ konkurantaj partioj: Esp. kaj Ido. La Idistoj tamen pretendis, ke ilia projekto estas „la maxim bona linguo" kaj reveni al Esp. estas „retrogresi"... Vidante, ke tia disputo kondukos al nenio utila, mi-konanta ambaŭ lingvosistemojn stariĝis por fari malgrandan rimarkigon kaj alvokon.

Mia rimarkigo estis, k e n e t e m a s p r i s u p e r e c o d e l i n g v o j: Ĉu el la ekzistantaj sistemoj povus pli malpli bone kontentigi la bezonon de helplingvo internacia, kaj eĈ Zamenhof, kiun oni plagiatis, ne pretendis pri „plej bona lingvo", lasante la pordon malfermita al l i b e r a evoluado, Ĉar reformojn, se necese, altrudus la vivo mem, sed ne ambicioj kaj kapricoj de privatuloj aŭ de komitatoj, eĈ se ili estus internaciaj aŭ socialistaj. Oni nur devus akcepti unu por ne malfidigi la publikon per multaj.

Mia alvoko estis pri interkonsento, toleremo, kion mi ne Ĉesis prediki depost kiom mi estas en Svisujo, la Ĉefa aŭ preskaŭ unika Idista nesto — kaj tio por la bono de la ideo mem de lingvo internacia. Per fanatikeco oni montrigos ĝin, per kontraŭbatalo oni diskreditigos ĝin. Kompreneble ne povas nei la ekziston de Ido, sed la idistoj ne estas sufiĈe fortaj por altrudi Idon, tamen sufiĈe fortaj por malhelpi, ke Esperanto kaj kun ĝi la ideo pri l. i. plene triumfu. Ni

celas la amasojn, kaj tiuj Ĉi estas embarasataj Ĉe la ekzisto de 2—3 projektoj: ne sciante kiun elekti, ili tute ne lernas kaj indiferentiĝas pri la bela ideo de l. i. Oni ofte aŭdas. „Interkompreniĝu vi Esperantistoj kaj Idistoj, poste ni vidos". EĈ se efektiviĝus la Ĉiama Idista kanto „lasi ambaŭ lingvojn en samaj gazetoj", tio ne allogus la publikon. Kontraŭe! Ne pro timo de komparo, la Esperantistoj rifuzas tion, sed pro timo de konfuzigo. Atendantej la demando komplikiĝas kaj ruiniĝas. Kiu ja garantias al ni, ke morgaŭ ne prezentiĝos ia alia projekto — dekregula anstataŭ deksesregula — superanta ambaŭ projektojn. se oni jam nun ne alprenas unu solan, por solvi unufoje por Ĉiam la problemon kaj fermi la pordon de l. i.? Kial atendi ĝis ia nova projekto, dum ni havas sub la nazo jam nun pretan vivantan lingvon, kiel Esp., kiu delonge estas elprovita kaj Ĉiutage uzata de miloj en Ĉiuj branĈoj de la homa agado? ĝis kiam oni ludos je lingvoj?! Kial „forlasi la kvietan, por postkuri la sovaĝan", diras bulgara proverbo?

Palpeblaj faktoj estas multe pli gravaj kaj allogaj. Ĉu Ido povas sin laŭdi kun literaturo originala kaj traduka, kiel Esp. Oni nur montru al ni verkojn kiel La Biblio, Hamleto, Ifigenio, La Faraono, la majstra verse-rime tradukita pola epopeo Sinjoro Tadeo k. a kaj organizaĵoj kiel U E A! Kiu Idisto povis travojaĝi la mondon nur dank'al sia lingvo, dum miloj estas la Esperantistoj, kiujn krom la disvasteco de la lingvo helpas kaj ligas ankaŭ varmiga „interna ideo"! Fine, la nombro de adeptoj, skribe kaj praktike uzantaj la lingvon, pli allogas ol Ĉiu scienco kaj logiko, pri kiaj cetere la Idistoj ankaŭ ne povus sin laŭdi.

Nun post la tutmonda kataklismo, estas la plej favora tempo por alpreno de lingvo internacia. Nun aŭ neniam! „La problemo de un mondlinguo mustas solvesar, solvesar balde", diras ankaŭ la Idistoj. Do, kial la malplimulto ne cedas antaŭ la plimulto, por eviti superfiluan batalon kaj fortigi la plej uzatan sistemon! Anstataŭ presenti pli malpli elpruvitajn sistemojn, ni solvu inter ni la demandon alprenante kaj propagandante la plej elprovitan lingvon Esperanto. Vana espero pri estonta triumfo estas nur malutila perdo de tempo kaj homoj, dum Esp. jam nun triumfas, estante akceptata de internaciaj kongresoj, rekonata de eminentuloj, enkondukata en lernejojn, uzata de komercistaj rondoj k. t. p. Neniu estas pli blinda ol tiu, kiu ne volas vidi!

Iu „neŭtrala" Ĉeestanto estis demandita Ĉu li komprenis la Esperantidan kaj Esperantan parolintojn. Li diris ke S-ron de Saussure li tute ne komprenis, sed S-ron Krestanoff sufiĈe bone. Sed, se iuj Idistoj asertas, ke ili ne komprenis min, estas pro tio, ke ili aŭ tute ne konas Esperanton, aŭ ne volas atenti, kio malpruvas ilian kredigon, ke la Idistoj konatiĝis kun Esp., dum la Esp-istoj tute ne volas lerni aŭ aŭdi Idon Se mi pli forte vokas al la Idistoj, estas, Ĉar ili ja „egale dankoze refuzas irga bazo por interkompreno" Al la rimarkigo de S-ro Berger (kiu cetere nek Esp-on, nek Idon bone parolas), ke mi estas „la unesma tolerema persono", mi respondis, ke mi estas.

nek la unua, nek la sola de la Esperantistoj, kiuj sincere deziras la interkonsenton. Ni Ĉiuj devas forlasi personajn preferojn, ambiciojn kaj kapricojn por alveni al akordiĝo, Ĉar de ni dependas la triumfigo aŭ entombigo de la kara ideo.

Oni riproĈas al Esperanto la oftajn Ĉ, ĝ, aj oj... Estas nur demando de kutimo, kaj oni povas alkutimiĝi al Ĉio. Estas ja ankaŭ tutmonde konata fakto, ke la itala lingvo havas plej multajn Ĉ kaj ĝ (ekz. Francia, cielo, pace, giardino, mangiare, elparolu franĈa, Ĉelo, paĈe, ĝardino, manĝare ktp.) kaj ĝi estas konata kiel la plej belsona lingvo. La „aj“, „oj“ renkontiĝas ankaŭ en malnovaj lingvoj (greka apostoloj, genajkaj ktp.) kaj abundas eĈ en novaj (ekz. franca bataille, travail ktp.). Tie Ĉi mi rememoras pri elokventa fakto. En 1916 mi vojaĝis kun mia edezino el Dresdeno al Davos. Survoje en la vagonaro kaj Ĉie ni interparolis en Esperanto — nia familia lingvo — Ĉar nek mi sciis bone la germanan, nek ŝi la bulgaran (mia edzino estas Esperantistino el Dresden). Iu el niaj kunvojaĝantoj — franceitala inteligenta sinjoro — kun kiu ni konatiĝis, elkriis post longa aŭdado: „Kiel la bulgara lingvo similas al la itala, pardonu pro la malĝentilaĵo, sed mi komprenis vian interparolon!“ Ni klarigis al li la eraron, kaj lia mirego estis granda, ankaŭ la rekono, ke Esperanto estas facila kaj agrabla, ne malfruiĝis.

Nun mi lastafoje venas al la konkludo de aliaj samideanoj, ke lingva interkompreno kun la Idistoj estas bedaurinde neebla, unue Ĉar je la lingva vidpunkto Esp. estas tiel taŭga kiel Ido, se ne pli; due-Ĉar, kiel jam montris la sperto, lingvaj diskutoj povas konduki al nenio alia ol la pereigo de Ĉiuj ĝis nun atingitaj rezultatoj sur la praktika kampo danĝerigi la estontecon de Esp. movado pro la plezuro varbi kelkdekojn da Idistoj, kiuj cetere neniam estos kontentaj, estus granda mallertaĵo. Ni devas stari firme sur la ĝisnuna fundamento kaj daŭrigi nian vojon. Estas utopio kredi, ke oni povas silentigi la reformistojn. Ili Ĉiam ekzistos, almenaŭ tiom longe ĝis kiam la lingvo internacia ne estas praktike uzata de centmiloj da homoj. Se ni iamaniere interkonsentus kun la nunaj Idistoj, morgaŭ venos aliaj reformistoj, kun kiuj ni denove devos diskutadi. Tio estus senĈesa interna batalado anstataŭ pozitiva agado.

La sola afero provebla estus interkonsenti pri tio, ke antaŭ fremda publiko Esperantistoj kaj Idistoj ne kontraŭbatalu unu la alian, sed insistu Ĉefe pri tio, kio ilin unuigas, nome la ideo de l. i. Tamen ilia interkonsento pune taktika estas malfacila pro la fanatikuloj de ambaŭ partioj. Ĝi postulas de ambaŭ bonvolon kaj toleremon, kiuj ofte mankas. La plej bona ideo utili al la ideo de l. i. estas reiri al la Esp. vicoj. Oni oferu al tio siajn lingvajn preferojn, kiel multaj jam faris. La okazo estas favora. Restante en la maldensaj Idistaj vicoj, oni ankoraŭ povas malutili al Esp., sed ne sukcesos triumfigi Idon. Revenante al ni, eĈ konservante siajn ideojn pri la lingvo mem, oni

helpos al la antaŭenpuŝo de l. i. La triumfo de Ĉi tiu ideo dependas ne de lingva perfekteco, sed de propagando kaj praktika uzado. La nombron ni jam havas, ni ne timu kaj kuraĝe antaŭen sur la vojo unufoje elektita!

Tion mi iam skribis al la prezidanto de la Ida Akademio, S-ro Schneeberger, tion mi ankaŭ nun rediras al tiuj, kiuj ne volis min kompreni EsperebLe la tempo komprenigos ilin.

Samideane via:

Iv. N. Krestanoff

(Sonnenbergstr. 19, Bern, Svisujo).

L. N. Tolstoj.

Du fratoi kaj oro.

Vivis iam, proksime al Jerusalemo, du fratoj, la pli maljuna Atanasio kaj la pli juna Joanno. Ili loĝis sur monto, proksime al la urbo kaj nutradis sin per tio, kion donacis al ili la homoj. La fratoj pasigis Ĉiujn tagojn en laboro. Ils ne laboris sian propran laboron, sed tiun Ĉi de la malriĈuloj. Kie estis senfortigitaj pro laboro, kie estis malsanuloj, orfoj kaj vidvinoj, tien iris la fratoj kaj tie laboris kaj foriris, prenante nenian salajron. Tiel pasigis la fratoj aparte la tutan semajnon kaj kunvenis sian loĝejon nur sabate vespere. Nur dimanĈe ili restadis hejme, preĝis kaj interparoladis. Kaj la Dia Anĝelo malsupreniris al ili kaj benis ilin; lunde ili disiris, Ĉiu en sian direkton. Tiel vivis la fratoj multajn jarojn kaj Ĉiu dimanĈe la Dia Anĝelo malsupreniris al ili kaj benis ilin.

Iun lundon, kiam la fratoj eliris laboron kaj disiris jam en diversajn direktojn, la pli maljuna frato, Atanasio, malĝojis, ke li devas disiĝi de sia amata frato kaj li ekhaltis kaj Ĉirkaŭrigardis. Ioanno iris, kun klinigita kapo, en sian direkton kaj ne rigardis returnen. Sed subite Ioanno ankaŭ haltis kaj kvazaŭ ekrigardinte ion, komencis, fikse, el sub la montoj, rigardi tien. Poste li alproksimiĝis al tio Ĉi, kion li rigardis, poste tuj desaltis flanken kaj, ne Ĉirkaŭrigardante, forkuris, for de Ĉi tiu loko, kvazaŭ persekutata de iu sovaĝa kruelega besto. Ekmiris Atanasio kaj revenis al Ĉi tiu loko, por ekscii, pro kio ektimis tiel lia frato. Li komencis alproksimiĝi kaj rigardas-sur la herbaro, kvazaŭ elŝufita el mezuro, kuŝas aro da oro... Kaj despli miris Atanasio la oron kaj la salton de sia frato.

„Pro kio li ektimis kaj de kio li forkuris?“ ekpénsis Atansio. „Nenia peko estas en la oro. La peko estas en la homo. Per la oro oni povas fari malbonon, sed ankaŭ bonon. Kiom da orfoj kaj vidvinoj oni povas nutrigi, kiom da nuduloj vestigi, kiom da kripluloj kaj malsanuloj kuracigi per Ĉi tiu oro! Ni servas nun al la homoj, sed nia servo estas negranda, laŭ niaj fortoj, kaj per Ĉi tiu oro ni povus pli efike helpi al la homoj“. Tiel ekmeditis Atanasio kaj deziris eldiri Ĉion Ĉi tion al sia frato; sed Ioanno estis jam maiproksime kaj li vidiĝis jam sur la alia monto nur kiel kokcionelo.

Kaj demetis Atanasio sian veston metis en ĝin tiom da oro, kiom li povis porti, surmetis ĝin sur la dorson kaj alportis ĝin en la urbon. Alvenis li gastejon, transdonis la oron al la mastro kaj revenis pri la restinta. Kaj kiam li alportis la tutan oron, li iris al la komercistoj, aĈetis lokon en la urbo, aĈetis ŝtonojn kaj lignaron, dungis laboristojn kaj komencis konstrui tri domojn. — Kaj travivis Atanasio en la urbo tri monatojn, konstruis en la urbo tri domojn: unu domo— rifuĝejo por orfoj kaj vidvinoj, alia domo — malsanulejo por kripluloj kaj malsanuloj, tria domo — por fremduloj kaj malriĈuloj. Kaj trovis Atanasio tri piajn maljunulojn kaj al la unua komisiis administri la rifuĝejon, al la alia la malsanulejon kaj al la tria la fremdgastejon. Kaj restis ankoraŭ al Atanasio tri mil da oraj moneroj. Kaj li trans donis al Ĉiu maljunulo po milo, por ke ili disdonu ilin laŭbezone al la malriĈuloj. Kaj Ĉiuj tri domoj komencis pleniĝi per popolo kaj komencis la homoj laŭdi Atanasion pri tio, kion li faris. Kaj tiel ĝojis Atanasio al tio, ke li ne volos forlasi la urbon. Sed amis Atanasio sian fraton kaj prenante adiaŭon de la popolo, ne lasante al si mem eĈ unu moneron, li ekiris returnen al sia loĝejo, en la sama malnova vesto, kun kiu li venis

Alproksimiĝas Atanasio al sia monto kaj pensas: „malĝuste pri pensis la frato, kiam li desaltis de la oro kaj forkuris de ĝi. Ĉu mi ne agis pli bone ol li?“

Kaj apenaŭ ekpensis Atanasio Ĉi tion, li vidas subite — sur la vojo staras la sama Anĝelo, kiu benis ilin kaj rigardas lin minace. Kaj svenis Atanasio kaj sole diris: „pro kio? Dio mia? Kaj malfermis la Anĝelo buŝon kaj diris: Iru for de tie Ĉi. Vi ne estas inda vivi kun via frato. Unu salto de via frato kostas pli kare ol Ĉiuj Ĉi tiuj faroj, kiujn vi faris per via oro“.

Kaj komencis Atanasio paroli pri tio, kiom da malriĈuloj kaj fremduloj li nutrigis, kiom da orfoj li prizorgis. Kaj la Anĝelo diris al li: la sama Diablo kiu metis Ĉi tiun oron por tenti vin, lernigis vin ankaŭ Ĉi tiujn vortojn.

Kaj tiam riproĈu Atanasion lia konscienco kaj li komprenis, ke ne por Dio li faris siajn farojn kaj li komencis plori kaj penti.

Tiam deiris la Anĝelo el la vojo kaj malfermis al li la vojon, sur kiu jam staris Ioanno, atendante la fraton. Kaj de Ĉi tiu tempo, persistis Atanasio al la tento de la Diablo, elŝutinta la oron kaj ekkonis, ke ne per oro, sed nur per laboro oni povas servi al Dio kaj al homoj.

Kaj komencis la fratoj vivi kiel pli frue.

Varna, 23. V. 920.

Tradukis el la rusa lingvo:
M. MILĈEV.

Nova sento.

(Kanto je memoro de mia eksaneco en la grupo „Ni Venkos“ en Karlovo 17. II. 1916).

Nova sento nin enspiras
Kanti lingvon „Esperanto“,
Ĉies koron ni deziras,
Fari ĝia subtenanto.

Rondon ni modestan kreis,
Kiu jam konstante kreskos
Kaj kun kredo ni ĝin nomis
Per simbolo kar' „Ni venkos!“

Ni esperas kaj laboras,
Pri la sankta, bel' ideo,
Kiu amon, bonon, portas
Al la homoj sur la tero.

Nir laboras, ne laciĝos,
Dum la granda laborado,
Ĉis la mondo konsciiĝos
Kaj nin benos en glorado.

Alte verdan la standardon
Tenas forte ni kun kredo,
Ke la sanktan idealon
Ni atingos en la fino.

Ĉiu kara deziranto
De la bono, amo, vero,
Estu nia li helpanto
Kaj servanto de l'espero.

En kantado pri l'espero
Pro prospero de la celo
Donu manojn kaj de koro
Voku: Vivu Esperanto!

P. Georgiev.

Suferado . . . !

Ĉesu mia suferado,
ĝojon donu al la kor',
Jam sufiĈas la plorado',
Venu la feliĈa hor' . . . !

Brust' junula ne eltenos,
Se ci, forta suferad',
Min eterne ho, turmentos
Sen pardono, sen kompat' . . . !

DolĈa la kantad' de l'birdoj,
Virgodoro de la roz' . . .
Nek la gajaj sunradioj,
Nek pureco de la ros' —

Ne ĝojigas mian koron,
Regas en ĝi glaciec' . . . !
Ve! mortigis mian koron
Suferado . . . pri junec'!

P. Georgiev.

Kiril Hristov.

Kanto fraulina.

Ne prenu de mia junbrusto la floron:
kune ĝi kantas . . . Ne prenu, amato!
ĝi aŭdis de mia koreto la ploron,
ĝi scias sekreton fatalan, juĝatan.

ĝin vidu! ĝi estas naiva kaj bela.
Sed tamen malsanas ĝi . . . Nu,
ĝin rosis nun ne la maten' duonhela,
Sed virga okul' kun enu'·

Panagjuriŝte, septembro, 1919 jaro. Trad. **Revanto.**

Ĉv. Stajkov.

Kazerno.

(Versaĵo en prozo)

Tra la pordego de grandega domo eniradis longega, senfina torento de homoj, kiuj tiel furioze kuradis turnovente, kiel la akveroj

de akvokaruselo. Tiu Ĉi domego spiris abomenon kaj teruron. ĝi tondris de malesperaj krioj kaj ĝemoj, kaj disportigadis malodoron de haladzigita sango en la aeron super la domo.

Sangsoifanta cerbero estis trans la pordego.

ĝi englutadis aŭ ĵetadis en profundan abismon la korpojn de l'malfeliĈaj estaĵoj eterne suferantaj kaj englutataj de l'morto.

Mi ekkonis en tiu domo la tuthomaran militejon.

Ne, fratoj! Ĉiulandanoj! ni ruinigu tiun hompereigejon!!...

Panagjuriŝte, 2. II. 1920

Ivan Vazov.

LA TURO

„Ne donu, Dio, la dezirajon de la malpiuloj, ne donu sukceson al iliaj malbonaj intencoj . . ."

Profeto Davido (Psalmo 139).

Terura horo! Bulgarujo tremas, kiel folio, kaj sub sufoko vivas! Per sia okulo ĝi penas mezuri la profundaĵon, kiu antaŭ ĝi rigardegas. Profundaĵo, kie mallumo regas, Ĉenoj tintas, maldormas la sangsoifaj vampiroj... Tiu Ĉi paco malbenita? Ho, ĝi ne estos! Tiu Ĉi paco de venĝo — estas paco sur sablo bazita, grand' konstruaĵo sur marĈa teraĵo, apenaŭ ligita — ĝi komencas balanci. Tiu Ĉi paco de venkinto pacon ne donas, tiu Ĉi paco venis post Pirusa venko.

Ho, venkintoj, sole la blindulo ne vidas la malfortikecon de via turo, Ĉar la venĝo estas ĝia kreinto, kaj la malico-nigra spirito de Velzevulo. Kaj ni, la premitaj ĝis la tero, pravas kun la spirito, kvankam senvoĈaj: Vi prenis nian glavon, sed ne la flugilojn de la kredo en estontecoj pli brilaj. Restis al ni la forto nevenkebla de la Juneco, kiu morti ne volas, kaj la Justeco — malproksima aŭ proksima — tie Ĉi sian feston triumfe havos. Ho, pli-malpli frue tiu tago ekbrilos, mi vidas ĝin en la mallumo, ĝi estas survoje, kaj tiu kiun vi en tombon metis, li reviviĝos, ke la Dia juĝo estas alia, ne via juĝo ĝi estas!

Trad. **Iv. H. Kr-off.**

Rim. *Ivan Vazov* estas la bulgara nacia poeto. Li travivis Ĉiujn ĝojojn kaj suferojn de sia malbonŝanca gento, depost la turka jugo ĝis tiu de la Okcidentaj „Demokratioj". La jena versaĵo estas tradukita pro ocupateco en prozo laŭvorte.

Konsiletoj al tradukontoj.

(Represita el Literaturo)

1. Ne tro penu traduki laŭvorte. La grava afero estas la fundamenta *ideo* de Ĉiu esprimo uzita de la aŭtoro: kaj estas bone, sin apartigi de la vortoj mem kaj formi la ideojn nur enpense. Tiam, reformu ilin en vortojn, sed en Esperantajn vortojn anstataŭ en anglajn. Tradukante idiomaĵon oni zorgu pri la vera signifo kaj traduku nur laŭ tiu signifo.

2. Memoru, ke D-ro Zamenhof diris, ke la vera Esperanta stilo estas nur stilo simpla kaj logika, kiu ne blinde imitas la stilon de tiu aŭ alia lingvo, sed havas sian karakteron tute spezialan kaj memstaran. La Majstro plue diris, ke se iu tradukos en Esperanton laŭvorte el sia nacia lingvo, lia stilo estos malbona kaj sensenca.

3. Tial, Ĉiam celu traduki klare kaj simple, memorante, ke vi tradukas por alilanduloj kiuj havas nenian scion pri la angla lingvo.

4. Bonaj gvidiloj por stilo estas *La Krestomatio* kaj ĝenerale la verkoj de Zamenhof, Kabe, Grabowski kaj aliaj konataj verkistoj.

5. Pro tio, ke la traduko super Ĉio devas esti facile komprenebla kaj klara, samtempe enhavanta la ecojn de la originalo, estas bone, ke antaŭ ol traduki iun pecon, oni legu kaj relegu ĝin, ĝis oni estas certa, ke la esenca signifo de la tuto. kaj la interrilatoj de ĝiaj partoj, estas plene komprenataj. Poste tradukinte la pecon en Esperanton, oni metu ĝin flanken dum kelkaj tagoj kaj tiam ĝin reprenu kaj relegu ne turnante sin al la originalo. Se en tiuj kondiĈoj la signifo de la tuto estas klara, kaj la frazoj flue legeblaj kaj sen gramatikaj eraroj. la tradukinto povos esti kontenta, sed se ne, aŭ se oni devas sin turni al la originalo por trovi la ĝustan signifon, sendube estas en ĝi io ne bona, kion estos necese refari.

6. Tradukado ne povas esti farata laŭ precizaj reguloj. Kiel supre montrite estas necese ke oni havu plenan komprenon de la originalo, kaj kompreneble ankaŭ de la signifo de ĉiu Esperanta vorto uzata. Oni do devas unue sin „identigi" kun la originala aŭtoro: kaj poste, sin transporti kvazaŭ en Esperanto-landon, por ke ĉiu vorto kaj frazo en la traduko estu tute logika kaj internacia. Oni fine legu laŭte la tradukon por kontroli ĝian „Esperantecon". Kaj oni Ĉiam memoru, ke la tradukado de bonaj literaturaĵoj *ne* estas facila afero sed ankaŭ ke, se oni *sufiĉe klopodas* kaj havas la kapablon por traduka laboro, oni povas prezenti per nia mirinda Esperanto la lingvajn nuancojn de preskaŭ Ĉiu nacia verko.

Ricevitaj gazetoj kaj broŝuroj.

Le Travailleur Esperantiste kaj **Esperantista laboristo** (aprilo). Administracio: L. Glodeau, 177 Rue de Bagnolet, Paris (Francujo). Entenas interesajn artikolojn kiel: Soldato universala, Bol-

ŝevismo kaj Esperanto, Ekrigardo al la internacia situacio k. t p. jarab. de ambaŭ gazetoj: 7·50 fr.

Respondo de la hungara scienca akademio al la Ĉeĥa akademio.

Esperanto Triumfonta (la estonte Ĉiutaga ĵurnalo de Esperantujo). Eldonanto: Teo Iung, Korrem-Cologne, Germanujo.—**Brazila Esperantisto** (jarkolekto de 1919 j.). Redakcio: Praça Quinze de novembro. Rio de janeiro. — **Esperanto, fulla de propaganda publikadà per l'Ateneu Enciclopédic popular.**

La studento, № № 1, 2, 3, jaro unua 1920, oficiala organo de la Pola studenta asocio en Erie P A U S A.

Cermana Esperantisto, № № 5 kaj 6 1920, oficiala organo de Germana Esperanto Asocio.

Espero Katolika, № № 5 kaj 6, 1920, oficiala organo de la internacia katolika unuiĝo esperantista.

Argentina Esperantisto, oficiala organo de Argentina Esperanta asocio, № 35, aprilo kaj majo 1920.

La Unuigita tuthomaro, vol II, julio 1920.

La Eklezia Revuo, organo de la Eklezia Esperantista Ligo, № 10, 1920.

La libro de komuna preĝo, kajero dua, 1920.

Letras, № № 13 kaj 15, 1920.

The Britich. Esperantist, № № 192—186, 1920.

Brazila Esperantisto, oficiala organo de „Brazila ligo Esperantista", januaro—marto 1920.

Esperanto, oficiala organo de UEA, majo kaj junio, 1920.

L'internationale chrétienne, № 1, 1929.

Esperanto Mitteilungen, № № 7—9, 1920.

Ще излѣзе отъ печатъ: *Ив. Х. Кръстановъ*, членъ отъ Еспер. Езиковъ Комитетъ. *Двоенъ Рѫчникъ Бъл.-Еспер. и Еспер.-Бълг. на международния езикъ Есперанто*, съ основна граматика. Съдържа всички официално одобрени думи (универсалния рѣчникъ и двѣтѣ притурки на Академията и Езиковия Комитетъ) и множество производни. Цѣна 12·50 лв. Доставя: Ник. Х. Кръстановъ гр. Пирдопъ.

N. B. Слѣдъ него излиза отъ сѫщия авторъ: *Допълнителенъ рѫчникъ* на международния езикъ Есперанто (съдържащъ не още официално одобренитѣ, но употрѣбявани въ есп. книжнина думи) и *Пъленъ учебникъ по Есперанто* за самоуци и курсове.

„Подъ Игото" на Есперанто. По случай прѣвеждането на *Подъ Игото* на Есперанто, г. Иванъ Кръстановъ въ Бернъ е получилъ слѣдното писмо отъ народния поетъ Иванъ Вазовъ:

„Моята оторизация имате. Благодаря Ви, че съ прѣвода си ще запознаете есперантския свѣтъ съ моитѣ творения. Мнѣнието

ми за Есперанто е, че е най-съвършениятъ до днесъ искуственъ езикъ, създаденъ съ цѣль да сближи человѣчеството и го направи по-достжпно за общокултурни цѣнности".

Прѣводътъ на Есперанто става отъ оригинала въ сравнение на нѣмския и френския прѣводи.

Esperplena Perspektivo.

Ĉiu propagandisto scias, ke multaj varbotaj por esperanto demandas: „Ĉu vi povas garantii, ke sufiĉe da miaj eksterlandaj korespondantoj scias esperanton aŭ lernos samtempe kun mi la mondlingvon? Kiom da mono proksimume mi ŝparos dum la venontaj jaroj uzante esperanton?" Ni ne trompu nin! Plejparte nia respondo ne kontentigas la demandantojn. La saman sperton oni faris, kiam estis instalitaj la unuaj telefonoj kaj poŝtĉekkontoj. La varbotoj milfoje rifuzis la partoprenon dirante: „Preskaŭ ĉiuj miaj konatuloj, kun kiuj mi volonte telefonus kaj interŝanĝus ĉekpagoin, ne havas telefonon aŭ poŝtĉekkonton". Por ke ĝi akcelu la disvastigon de la telefonoj kaj de la poŝtĉekkontoj, la germana poŝtadministracio fiksis la taksojn tiel malalte, ke la partoprenantoj havis monajn profitojn. La ekonomie gravega telefonado kaj la senkontanta pagmaniero per tiu aranĝo atingis grandan disvastiĝon kaj modelan perfektiĝon dum malmulte da jaroj.
Tiaj pripensoj instigis la skribinton de tiuj ĉi linioj, propagandi la ideon, ke ankaŭ esperanto kiel kultura faktoro kaj nepre necesa ilo por la internaciaj poŝtaj, telegrafaj kaj telefonaj rilatoj estu sammaniere apogota per la poŝtaj administracioj. Al petskribo la germana poŝtministro respondis jenon:

„La Poŝtministro. Berlin W 66, la 2-au de Februaro 1920.
I/III C 691

Al sinjoro Vice-Poŝtdirektore O. Rieck
Greifswald.

La demando pri moderigo de taksoj por eksterlandaj leteroj, skribitaj esperante, verŝajne estos diskutata detale dum la venonta Universala Poŝta Kongreso.

Je la ordono de la ministro Ronge."

Ĉu ankaŭ via poŝtadministracio estas tiel informita, ke ĝi povas partopreni pri la diskutado en la baldaŭa kongreso? Eble vi eĉ ne priparolis la aferon kun viaj komercaj societoj! Evitu la situacion, ke viaj postaĵ delegitoj eble devas klarigi, ke en ilia lando ne unu per-

sono deziras moderigon de la pagoj por eksterlandaj malfermitaj esperantaj leteroj. Estas sufiĈe certe, ke oni duobligos la internacian leter afrankon, Ĉar la militintaj ŝtatoj bezonegas monon. Se oni permesos la malnovajn taksojn al la progresemaj kaj oferemaj amikoj de la mondlingvo la ŝtatoj havas nur tre malgrandajn monperdojn dum la unuaj jaroj kaj lasos la esperon al la homaro, ke depost funda plibonigo de la mondstato kaj la venko de esperanto oni returnos al la iamaj taksoj.

Estas danĝero, ke reformemuloj, kiel jam ofte, provos piedpremi la ekĝermantan esperantan semon. Ili pripensu, ke estas malsaĝeco, grefti fruktarbon antaŭ ol ĝi superkreskis la herbon. La esperanto-arbo, kiu iam superombros la tutan mondon, ne devas esti plibonigata per sola homo, sed per la reprezentantoj de Ĉiuj nacioj, la Interpopola Ligo. Antaŭ Ĉio ni ankaŭ devas konsideri la opiniojn de la hinoj, hindoj, japanoj persoj, araboj ktp., pri kiuj ĝis nun oni ne sufiĉej atentis.

Se ni atingos la taksmoderigon por esperantaj leteroj, esperanto baldaŭ enmarŝos en la lernejojn. Tial ni tuj milobligu niajn laborojn, interesigu la komercajn societojn, petskribu al la poŝtaj administracioj kaj veku la dormantojn, nur tiam ni rajtos esperi plenumon de nia deziroj.

O. Rieck, Del. de U. E. A.

„La dua Internacia Foiro de Frankfurt a. M. montris denove la fortan konfidon de la eketer- kaj enlando al la Frankfurtaj foiroj. Apogite sur tiun-Ĉi fakton la foiroficejo komencis la preparojn por la

3a INTERNACIA FORIO DE FRANKFURT a. M.

okazonta de la 3a — 9a de oktobro 1920.

La programo de la Frankfurtaj foiroj estas: Importo kaj eksporto, akcelado kaj rekonstruado de la internacia interŝanĝo de komercaĵoj.

Por la printempa foiro de Frankfurt a. M. la unuan fojon en grandfoiro oni efektivigis la laŭbranĈan grupigon de la ekspoziciantoj. La bonaj spertoj de tiu-Ĉi sistemo kaŭzos la saman aranĝon en estonto.

La ampleksa specimen-ekspozicio Ĉirkaŭos 29 Ĉefgrupojn kaj diversajn subfakojn.

La prospektoj de la foiro estas riceveblaj en 9 nacilingvoj kaj en Esperanto.

Oni ricevas Ĉiujn informojn kaj detalojn laŭ la adreso Messamt: (Esperanto-Werbestelle), Frankfurt a. M., Germanujo".
